# *Kubo kaj ?inio plifortigas siajn ekonomiajn rilatojn.*



Havano, 19 jun (RHK) En la komerca forumo Kubo-?inio okazinta en la Hotelo Nacional, oni subskribis interkomprenan memorandon inter la ?ina konsilantaro por komerco internacia (CCPIT) kaj la komerca ?ambro de Kubo, kio ratifas ?inion kiel la ?efa komerca partnero de Kubo.

Rubén Ramos, vicprezidanto de la kuba institucio, kaj Wu Guiying, prezidantino de la ?ina institucio ?e la subkonsilio Zheijiang, subskribis la interkonsenton kiu starigas la le?an kadron por la rilatoj inter amba? institucioj.

La memorando celas impulsi komercon kaj investon de ?inaj entreprenoj en Kubo, kaj malfermi eblecojn por vizitoj de entreprenistoj de la azia lando al Kubo por esplori la insulan merkaton, esprimis Ramos.

Wu Guiying asertis ke Kubo estis la unua latinamerika lando kiu starigis diplomatiajn rilatojn kun tiu azia lando kaj elstarigis la impulson al la reciproka komerco.

Zhejiang situas en la sudorienta marbordo de ?inio kaj ties ekonomio lokis ?in en la avangardo de tiu lando. La evoluo en la teknologia areo ampleksas je 10% de la ?inaj produkta?oj, ?i aldonis.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/164958-kubo-kaj-cinio-plifortigas-siajn-ekonomiajn-rilatojn

# Radio Habana Cuba